# *Alia vakcina kandidato kuba eniras la fazon III de klinikaj provoj: Abdala*



Havano, mar 19 (RHK) La Centro por Kontrolo ?tata de Medikamentoj, Instrumentoj kaj Medicinaj Aparatoj (Cecmed, hispane), aprobis la duan klinikan provon fazo III en la insulo por Abdala, alia el la kubaj vakcinaj kandidatoj dedi?itaj al prevento de la Kovim-19; kaj samtempe, la entreprena grupo de la industrioj bioteknologia kaj farmacia de Kubo (BiocubaFarma) sciigis per Tvitero, ke ses produktlinioj en kelkaj entreprenoj de tiu grupo laboras en la fabrikado de la vakcinoj, kaj plej malfrue, en a?gusto ?i-jare ?i havos la dozojn bezonatajn por imunizi la tutan kuban lo?antaron.

La? la koncerna reguliga centro, Cecmed, la aprobo donita por Abdala sin bazas en la rezultoj de sekureco kaj imunogeneco montrita de la produkto dum la klinikaj provoj fazo I kaj II, kaj tial oni konsideras ke ?i povas pli evolui klinike, irante al tiu supera fazo, kiu implicas la partoprenon de pli granda nombro da volontuloj.

La? raporto de la nacia televido oni sciis ke la klinika provo komenci?os venontsemajne en la ?efurboj de la orientaj provincoj Santiago de Kubo, Granma kaj Guantánamo, kaj inkluzivos 48 000 personojn; la? la reguliga centro, la provo ebligos demonstri la efikecon de la produkto la? la landaj kaj internaciaj kriterioj establitaj de la Monda Organizo pri Sano por ?i-specaj vakcinoj.

La dro. Eduardo Martínez, prezidanto de BioCubaFarma, asertis ke la? la vakcinaj variantoj pliboni?is, oni strukturis la produktivajn sistemojn tiel ke, demonstrite iliaj sekureco kaj efikeco, oni povus fabriki milionojn da dozoj. Tiamaniere tiu ?i institucio solidigas la celon ke en la nuna jaro la kuba lo?antaro estu vakcinita.

La garantio estas en la evoluo ?isnuna de la klinikaj provoj de la du plej gravaj kandidatoj, Soberana 02 kaj Abdala, kies provoj avancas tute normale dum la esencaj etapoj por pritaksi ?ian sekurecon kaj efikecon.

Kubo anka? kunlaboras kun kelkaj landoj cele al batalo kontra? la pandemio. Inter tiuj kunlaboroj inkluzivitaj en la insula strategio por evoluigi vakcinojn kontra? la malsano, estas tiuj plenumataj kun ?inio, Venezuelo, Irano kaj Meksiko.

En tiun direkton iras la subskribo de interkonsento, pasintjanuare, inter la Instituto Finlay de Vakcinoj kaj la Instituto Pasteur de Irano kun la celo efektivigi klinikan provon fazo III de la vakcina kandidato kuba Soberana 02 por pritaksi ?ian efikecon, la plej evoluinta de la kvin kandidatoj vakcinaj de la insulo.

Fonto: Granma

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/251236-alia-vakcina-kandidato-kuba-eniras-la-fazon-iii-de-klinikaj-provoj-abdala](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/251236-alia-vakcina-kandidato-kuba-eniras-la-fazon-iii-de-klinikaj-provoj-abdala)

Radio Habana Cuba